

La 10an de februaro 2016

Kunveno por postuli forĵeton de ĉiuj 10 nukleaj reaktoroj en
Fukuŝima



La 10an de februaro okazis en la urbo Iŭaki de la gubernio Fukuŝima “Kunveno por postuli forĵeton de ĉiuj 10 reaktoroj en Fukuŝima”. En Fukuŝima troviĝas du nukleaj centraloj. En la unua troviĝis/as 6 nukleaj reaktoroj, el kiuj 4 estis difektitaj en la cunamo kaj la aliaj du apenaŭ saviĝis. TEPCO jam decidis forĵeti ĉiujn 6, sed por finforĵeti ilin, oni bezonas 40 jarojn aŭ pli, kaj ĝis la fina forĵetado tiuj estas danĝeraj, do mi ne povas uzi vortojn “forĵetis aŭ troviĝis”, sed mi devas daŭre uzi vortojn “forĵetas aŭ troviĝas”. En la dua centralo troviĝas 4 reaktoroj, kaj la

gubernio Fukuŝima kaj ĉiuj 59 urboj kaj vilaĝoj de Fukuŝima postulas forĵeton de tiuj kvar, sed TEPCO kaj la registaro nebule respondis pri tiu postulo. En la kunveno s-ro Koizumi Ĵuniĉiroo, la eksa ĉefministro, kaj aliaj postulis ŝanĝon de la japana energipolitikon.

Mi kaj mia edzino, akompanate de ges-roj Tanĵi, rifuĝintoj el tiu urbo Iŭaki, partoprenis en la kunveno. Venis al ĝi 1500 homoj el diversaj urboj en Fukuŝima. Plejparto de ili estis maljunuloj. La 10a da februaro estis semajna tago, do laborantaj homoj ne povis partopreni, sed tro maljunaj estis la partoprenantoj.



Prelego de s-ro Koizumi Ĵuniĉiroo

Koizumi naskiĝis la 8an de januaro 1941. Li oficis kiel la ĉefministro inter aprilo 2001 kaj septembro 2006. Li oficis pli ol 5 jarojn en la posteno, tre longe kompare kun aliaj ĉefministroj. Li estis tre populara. Dume li partoprenigis japanajn defendkorpuserojn en la Irakan Militon, akceptinte postulon de Usono, kaj li estis subtenanto de atomenergipolitiko.

Tamen post la nuklea akcidento en 2011 li ŝanĝis sian sintenon pri tiu politiko kaj komencis agadi kontraŭ ĝi. En la elekto de la guberniestro de Tokio en februaro 2014 li kandidatigis eksan ĉefministron Hosokaŭa. Ili ambaŭ batalis kontraŭ la atomenergipolitiko, ĉar Tokio estis la plej granda konsumanto de elektro el Fukuŝima. Bedaŭrinde ili malvenkis, sed Koizumi plu batalas, prelegante en diversaj lokoj en Japanio. Jen resumo de lia prelego:

Ofte oni kritikas min pro tio, ke mi nun kontraŭas atomenergian politikon, kvankam mi estis por ĝi, kiam mi estis ĉefministro. Dum tiuj jaroj mi kredis la aserton de scienculoj okupiĝantaj pri nukleaj aferoj, sed kiam okazis la nuklea akcidento, mi komencis mem studi pri la afero kaj rimarkis, ke mi estis trompita de tiuj scienculoj. La ĉina saĝulo Konfuceo diris: “Ne hezitu korekti sian eraron”, do sekvante lin, mi komencis movadon kontraŭ atomenergio.

1. Mensogo de “malmultekosteco, sekureco kaj pureco” de atomenergio

Pri sekureco: Ankoraŭ nun la registaro diras, ke elektro el nukleaj reaktoroj estas la plej malmultekosta, sed tio ne estas vera. Kiel dankmonon la registaro multe pagas al la komunumoj, en kiuj staras nukleaj centraloj, kaj kiam okazas akcidento, oni devas pagi multe da kompensa mono. Konstrui nukleajn centralojn multe kostas, do sen garantio de la registaro, bankoj ne pruntedonas monon al elektraj kompanioj. En aprilo finiĝos monopolo pri elektroproduktado kaj vendado de la elektraj kompanioj, kaj alikampaj kompanioj eniros en tiun kampon. Elektraj kompanioj timas, ke ili malvenkos, kaj petas subvencion de la registaro. Nukleaj centraloj estas monvoraj.

Pri sekureco: Kiam okazis akcidentoj en Three Mile Island kaj Ĉernobil, japanaj scienculoj kaj la elektraj kompanioj insistis, ke en japanaj centraloj neniam okazos gravaj akcidentoj, ĉar japanoj tre severe kontrolas ilin, sed mi sciis, ke okazis multnombraj akcidentoj ankaŭ en la Japanio. Nun la estro de Nuklea Reguligada Aŭtoritato diras: “Mi neniam diras, ke la aprobitaj reaktoroj estas sekuraj”, sed la ĉefministro Abe senbaze diradas, ke tiuj reaktoroj estis aprobitaj laŭ la plej severaj normoj en la mondo”.

Pri pureco: Japanaj reaktoroj situas apud maro por ke oni uzu marakvon por malvarmigi la boligitan akvon en reaktoroj. En la marakvo troviĝas diversaj vivaĵoj kaj ili iom post iom ŝtopas la tubojn. Por deskrapii tiujn, oni uzas kloran medikamenton. Varmo kaj tiu medikamento mortigas la maron. Nukleaj reaktoroj multe poluas la medion.



2. Nenie troveblas forĵetejo de nukleaj rubaĵoj en Japanio

Mi vizitis Onkalo-n, la finan konservejon de nukleaj rubaĵoj en Finnlando. Tie oni konstruis konservejon 2 km² vastan en stabila roktavolo 400 metrojn profunda. Finnlando havas 4 reaktorojn, sed ĉi tie oni povos konservi rubaĵojn el nur du reaktoroj, kaj por la aliaj du, oni ne havas konservejon. Japanio estas vulkana lando, tial

oni ne povas trovi tiel stabilan lokon kiel en Finnlando, krome en Japanio homoj loĝas tiel dense, ke estas ne eble trovi taŭgan lokon por konservejoj.

3. Japanio povos progresi sen atomenergio

Germanio deklaris, ke ĝi estu libera de nukleaj centraloj, sed ankoraŭ ne estas libera de tiuj, male Japanio ne deklaris tion, sed fakte ĝi estis tute libera de tiuj dum 2 jaroj kaj preskaŭ libera dum 3 jaroj, komence kun unu kaj nun kun tri funkciantaj reaktoroj. Estas klare, ke Japanio povas progresi sen nukleaj centraloj. Se Japanio pli uzos recikligan energion, nia ekonomio pli progresos. Japanio ĉiam venkis malfacilojn en nia historio, ekzemple ni malvenkis en la milito kaj perdis ĉiujn teritoriojn ekster la japana insularo, sed nun ĝi pli progresas. Japanoj havas kapablon ŝanĝi malfacilojn en bonajn ŝancojn. Nuligi nukleajn centralojn estas granda revo, sed ne neplenumbla revo. Ni kune strebu! (fino de la resumo)

Korekti erarojn estas bona afero, sed kial li aŭsklutis nur opiniojn de tiuj aĉaj, trompulaj scienculoj? Jam longantaŭe troviĝis sinceraj scienculoj, kiuj kontraŭas atomenergion kaj avertis danĝeron de nukleaj reaktoroj. Li vekigis kaj nun agadas. Tio estas laŭdinda afero, sed mi bedaŭras, ke li dormis, kiam li estis ĉefministro. Li nun ekzigis eĉ de la posteno de parlamentano, do por aĉa ĉefministro Abe, li estas homo neglektebla.

Mi trovis, ke li estas samaĝa kiel mi. Li naskiĝis en januaro 1942 kaj mi naskiĝis en decembro 1941. Li vigle agadas, do ankaŭ mi vigle agadu por savi Japanion.



Saluto de la urbestro de Minami-Sooma s-ro Sakurai Kacunobu

Ankoraŭ nun rifuĝas 27000 homoj el la urbo Minami-Sooma. Tiu ĉi nombro estas la plej granda el tiu de ĉiuj urboj damaĝitaj de la cunamo. El tiuj 27000, 9300 jam translokiĝis al aliaj urboj kaj ne plu estas niaj urbanoj, 10000 loĝas ekster la urbo kaj la aliaj 8000 loĝas ja en la urbo, sed for de sia domo.

La urbo estis atakita de la cunamo kaj malaperis 2500* homoj, kiujn ni devis serĉi, kaj poste okazis la nuklea akcidento. Tamen nek la gubernio, nek la registaro donis informon pri la situacio. Ili malestimis nian vivon. Ili forĵetis nin. Ni ĉiuj estis koleregaj.

* El tiuj 2500, oni trovis 997 homojn mortaj.

Poste, la 15an de marto, mi aŭdis en televido, ke la nuklea reaktoro n-ro 3 estas en danĝero. Mi sciis, ke en tiu reaktoro oni bruligas MOX-brulaĵon. Se okazos grava akcidento, el ĝi elfluos la plej danĝera radioaktivaĵo plutonio, do mi sola decidis rifuzigi 14000 urbanojn al Niigata. La guberniestro de Niigata promesis, ke li akceptos ilin, ĉar ankaŭ en Niigata troviĝas nuklea centralo de TEPCO, do li kompatis nin, opiniante, ke mia hodiaŭa sorto estas lia morgaŭa sorto.

Antaŭ la akcidento la registaro instrukiis, ke la urboj, en kiuj situas nukleaj centraloj, ne faru rifuĝplanon por la loĝantoj en la radiuso de 10 kilometroj, ĉar tio donos al ili maltrankvilon. La registaro kredis kaj kredigis al la popolanoj, ke en Japanio neniam okazos severa akcidento.

Pro la akcidento nia urbo estas dividita en tri kategoriojn laŭ la distanco de la difektita nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, nome la zono ene de la radiuso 20 kilometroj, la zono inter 20 kaj 30 kilometroj kaj la zono ekster 30 kilometroj*. Pro tio iuj loĝantoj devis tuj rifuĝi, aliaj estis ordonitaj atendi, kaj la aliaj ne bezonis rifuĝi, kaj laŭ tiuj kategorioj TEPCO pagis/as kompensan monon. Tio donis grandan malfacilon al la loĝantoj, kaŭzante malharmonion inter ili, ĉar radioaktivaĵoj ne falis laŭ la kategorioj. Okazis, ke eĉ lokoj en la zono ekster 30 kilometroj estas tiel poluitaj, ke homoj tie devis fuĝi, sed TEPCO ne pagis kompensan monon al ili.

*Vidu la mapon en la paĝo 9.

La 11an de aŭgusto 2015 ekfunkciis la nuklea reaktoro en la nuklea centralo Sendai en la suda insulo Kjuuŝuu. La ĉefministro Abe bele diras: “Sen restariĝo de Fukuŝima, neniam efektiviĝos restariĝo de Japanio”, sed se li vere kredas tion, kial li aprobis la refunkciigon de tiu reaktoro? La gubernio Fukuŝima kaj ĉiuj 59 urboj kaj vilaĝoj en Fukuŝima postulas forĵeton de la 4 reaktoroj en la nuklea centralo n-ro 2 de Fukuŝima. Sed la registaro neniam respondis klare. TEPCO diras, ke la registaro ne diras

klare, do TEPCO ne povas decidi. Mi suspektas, ke ambaŭ volas funkciigi tiujn 4 reaktorojn.

TEPCO ne havas rajton, nek kapablon refunkciigi tiujn reaktorojn. 10 tagojn post kiam okazis tiu akcidento, respondeculo de TEPCO vizitis nin. Kial ili ne tuj venis al nia urbo? Kiam ni vizitis la prezidanton de TEPCO en Tokio kun petoj, li salutis nin en la vestiblo, ne invitante nin en sian ĉambron. Kial la prezidanto mem ne venis por pardonpeti de ni pro la akcidento? TEPCO diris, ke neniu mortis pro la akcidento. Ĝi estas tia kompanio, ne havanta taŭgecon, nek sincerecon, nek kapablon kiel kompanio produktanta elektron per nukleaj reaktoroj.

La urbo Minami-Sooma deklaris en marto 2015, ke ĝi estu la urbo sen nuklea centralo, esperante la socion kun recikliga energio. Ni kune faru tian mondon!

(Fino de la saluto)

Lia saluto emociis min multe. Mi jam kelkajn fojojn vizitis la urbon. Vere ĝi suferas multe pro la tertremo, cunamo, nuklea akcidento kaj malfameco de la nomo Fukuŝima. Vidante la mizeran staton de la urbo kaj la urbanoj, mia kolerego kontraŭ la nuklea akcidento kaj la energipolitiko de la nuna registaro ne tolereble grandiĝis. Do mi aŭskultis lian saluton kun grandega emocio.

Pri la nuklea centralo n-ro 2 la posta preleganto diris jene: la registaro timas, ke elektro mankos por la Olimpikoj okazontaj en 2020. Pro tio ĝi volas uzi elektron el la nuklea centralo n-ro 2 de Fukuŝima.

Antaŭe Tokio uzis 32% da elektro el la gubienio Fukuŝima kaj 20% el le gubernio Niigata. En Niigata estas la nuklea centralo Kaŝiŭazaki-Kariŭa de TEPCO, kiu havas 7 reaktorojn kaj kies suma produktkvanto de elektro estis 8,21 milionoj da kilovatoj. Tiu kvanto estis la plej granda en la mondo, sed en julio 2007 okazis granda tertremo en la maro de Niigata kaj la centralo difektiĝis kaj haltis. La guberniestro Izumida ne fidis TEPCO-on pro ĝiaj oftaj malsinceraj agadoj, tiel ke li ne permesas al TEPCO refunkciigon, postulante, ke TEPCO unue faru esploron pri la kaŭzoj de la akcidento en Fukuŝima. Certe la registaro premas la guberniestron

diversmaniere, sed ĝis nun ĝi ne sukcesis persvadi lin. Eble ankaŭ en 2020 estos malfacile ricevi elektron el Niigata.

Do ĝi volas rezervi Fukuŝima-on kiel alian elekton. Ĝis la Olimpikoj, la registaro provas kapitulaci Niigata-on aŭ Fukuŝima-on per minaco, per mono kaj per intrigo.

Fine de la kunveno ni adoptis la rezolucion, en kiu oni menciis jenajn aferojn:

1. Laŭ la censo la nombro de la loĝantoj en la subaj urboj proksime de la nuklea centralo n-ro 1 estas:

Namie: 0	Ookuma: 0	Fukata: 0
Tomioka: 0	Iitate: 41	Kacurao: 18

En la moderna historio de Japanio tia afero neniam okazis, eĉ dum la dua mondmilito, en kiu 62 000 fukuŝimaanoj mortis.

2. Kvin superaj mezlernejoj laŭ la marborda regiono fermos portempe (tamen eble multajn jarojn).

La rezolucio finiĝis jene:

Ni ĉiuj, ordonitaj rifuĝi aŭ ne, rifuĝantaj aŭ ne kaj revenintaj aŭ ne, komprenu unu la aliajn, man-en-mane, kaj fortigu nian decidon, ke ne plu okazu aliaj nukleaj akcidentoj.